

# FENIKSO



INFORMILO POR

## AMIKA

## RONDO DE

## ESPERANTAĴ-

## KOLEKTANTOJ



Redaktas: R. Jensen, Sdr. Ringg. 77, DK-8000. Århus C

Nr. 15. 1. 5. 1971

Tria jaro nr. 3

### LA VARBSTAMPOJ

Oni povas akcepti ke por laŭtema kolekto sufiĉas posedi la ordinaran tipon sen konsideri la eventualajn inkkolorojn aŭ variaĵojn, sed, oni ankaŭ povas konsenti ke la akcepto de stampoj kun eraroj, variaĵoj aŭ diversaj inkkoloroj (kondiĉe de pruvata aŭtentikeco) agrable kompletas la kolekton. Estas almenaŭ mia opinio.

La memorigaj poŝtmarkoj estas veraj propagandiloj, kaj certe ili per siaj milionoj da ekzempleroj estas la plej efektiva reklamilo. Sed la uzo de meĥanikaj stampoj kun reklamteksto alvenas je la dua pozicio por atingi la plej vastan publikon. En Francujo la porokazaj reklamstampoj ofte estas uzataj dum pluraj semajnoj. Imagu ekzemple: la ĉi-jara Lyona varbstampo uzita en la centra poŝtoficejo, kie estas stampitaj ĉirkaŭ 30 000 korespondaĵoj po tago. Kalkulu vi mem kiom da personoj pere de tio ekscias ion pri la kongreso. Flanke de la propaganda vidpunkto la celo estas plenplene atingata. La rezulto estas multobla kompare al

la memorigaj poŝtstampoj, kiujn uzigas nur la kelkcentoj da kongresanoj kaj eksteraj filatelitoj en la speciala poŝtoŭficejo en la kongresejo.

Dum longa kaj intensa uzo ne estas strange ke okazu kelkaj eraroj dum la manipulado de la ronda datstampo. Ĉiutage oni ŝanĝas la daton, kaj ankaŭ plurfoje dum la sama tago oni movas la blokon, kiu indikas la horon. La konsekvenco povas esti, ke la ronda datstampo tute aŭ parte aperu renversa. Similankazon mi jam menciis en la lasta Fenikso koncerne la franca stampo nr. 25. Ankaŭ povas okazi ke la reklamkliŝo estas kombinita kun diversaj datstampoj dum la periodo de uzo. Ekz.: tiu Lyona maŝinstampo aperis kun 2 diversaj datstampoj.

La diferenco estas videbla en la suba teksto en la paranteso:

- a) (1<sup>er</sup> ARR.) = punkto post ARR. ( ) - 16 mm  
 b) (1<sup>er</sup> ARR) = neniu punkto. ( ) - 14 mm

Do ĉu ni devas konservi 2 varbstampojn kies nura diferenco estas iu ŝanĝo en la datstampo?

Certe kelkaj inter vi diros: "Ni kolektas nur Esperanto-poŝtstampojn, kaj la parto de la stampilo kiu ne havas direktan rilaton kun nia temo ne interesas nin."

Al tio mia persona opinio estas, ke ili nur duonpravas - kaj jen kial.

Kiel jam dirita, ĉiu meĥanika stampilo konsistas el du apartaj eroj: la ronda datstampo kaj la varbteksto aŭ sistemo de ondlinioj. Se oni povas facile ŝanĝi la ordon aŭ la prezenton de la 2 eroj, ambaŭ - kaj NUR la 2 kuneformas la stampilon. Ĝi ne estas eble munti sur la maŝino nur la varbtekston aŭ nur la datstampon, sed estas absolute necesa munti la 2 elementojn. Do - se unu el la 2 eroj ŝanĝas, samtempe ŝanĝas la efiko de la tuta stampo - almenaŭ laŭ filatela vidpunkto. Se ni konsideras la problemon inverse, miaj eldiroj estos eble pli facile kompreneblaj: Se unika datstampo es-

tas uzata kun 2 malsamaj varbtekstoj, unu post la alia, oni logike kaj prave konkludas, ke temas pri 2 ne identaj stampoj, - ĉu ne?

Do, ankaŭ validas la kontraŭo.

Amouroux

-o00o-

### VIOLKOLORA ITALA STAMPO. MISTERO KRESKAS

Sekve de mia noto en la lasta Fenikso koncerne la violkolora itala stampo de 1958 mi ricevis 2 afablajn leterojn de s-roj Boscarino kaj De Salvo. Ŝajnas al la unua ke la poŝto ne uzis koloran inkon dum la kongreso. La dua estis juna partopreninto de la kongreso. Li ne povas aserti, ke violkolora inko estis uzata dum la evento, sed li asertas ke la itala poŝto efektive uzis violkoloran inkon, eksperimente, en Sicilio dum la jaroj 1955 ĝis 1961.

Anbaŭ mi dankas kvankam certecon ili ne povis doni: ĉu jes - ĉu ne.

Post tio mi denove rigardis la stampojn, kaj mi havis novan surprizon: Miaj ruĝaj sta indikas la jaron nur per la du lastaj ciferoj "58". Sur mia viola stampo la jaro estas esprimita per ĉiuj 4 ciferoj "1958".

Do ŝajnas ke temas pri 2 diversaj stampiloj.

Nova mistero alvenis, kaj la malnova pri la koloro restas.

Amouroux

-o00o-

### PRI KOLOROJ DE STAMPOJ

Pli malpli oficiale aperas porokazaj stampoj en diversaj koloroj. Post eĉ nelonga tempo estas jam tre malfacile esplori, ĉu la kolornuancon permesis uzi poŝtaj instancoj aŭ nur loka poŝtoficisto (kaj tio lasta ankoraŭ ne oficialigas la koloron) aŭ simple ĝin per propra ink-kuseno elsorĉis fervora stamp-kolektanto sopiranta havi "raraĵon".

Tiu ĉi sorton renkontas ankaŭ E-stampoj kaj vi scias, kiom da kolornuancoj en nia katalogo estas por ni enigmaj.

Kompreneble por niaj kolektoj sufiĉas unu koloro, pri kiu ni estas certaj, ke ĝi estas de oficiala origino. Tamen la kolornuancojn interesas kelkaj kolekto-specialistoj inter ni, do estas bone - se ne katalogi ilin, do almenaŭ informi niajn membrojn pri ilia ekzisto.

Mi mem ne forĵetas ilin, eĉ se mi scias, ke temas pri fantaziaĵoj, ĉar, kiu scias, ĉu estonta generacio ne sanktigos ilin?

En pasinta jaro mi vidis verdan nuancon de stampo Lodz, Pollando, kvankam nur sen normala poŝta stampo, ĉar temas pri apudstampo.

Ankaŭ stampo Abaliget 1970 mi ricevis unue en verda koloro sur koverto kaj poste en nigra koloro sur poŝtkarto. Diveni, kiu el ili estas kaj kiu ne estas oficiala, mi ne volas.

En ĉiu lando estas aliaj leĝoj kaj kutimoj. En unu nur la plej supra poŝta instanco povas permesi uzon de pluaj koloroj, en alia lando eble por oficialigo sufiĉas nur permeso de la koncerna poŝtestro.

Frank Tichý

□□□□

### STAMPO-SERVO INFORMAS:

Post longa paŭzo, kaŭzita de familiaj zorgoj mi volas informi koncize niajn membrojn pri la pasinta jaro.

Bilanco de la jaro 1970 koncerne E-stampoj estas riĉa. Aperis entute 26 diversaj stampoj en 11 landoj. Se ni kalkulas ankoraŭ 3 diversajn en GDR kaj tipojn de Monte Carlo, Augsburg kaj Wien, la nombro atingas 35. Bela rikolto, kaj por Stampo-servo plenmano da zorgoj.

Dank'al kunlaborantoj en pluraj landoj kaj klopodo akiri stampojn en landoj, kie ni ne havas membrojn, mi povis dissendi al abonantoj de novaĵ-servo ĉiujn stampojn krom 2 tipoj de Mon-

to Carlo kaj la itala de Palermo. Tamen pri la lasta mi ankoraŭ esperas ricevi almenaŭ kelkajn por eventuala kompletigo de viaj-kolektoj.

Mi ĝojas, ke mia modesta laboro helpis finance obliigi aperon de 6 numeroj de Fenikso kaj doni tiel al niaj membroj plurajn valorajn informojn kaj instigojn.

Ne tiel favora estas perspektivo de Stampo-Servo por la jaro 1971. Ne nur pro tio, ke kreskis nombro de novaĵ-abonantoj al 18 kaj prizorgi por ili sufiĉan kvanton de ĉiŭ nova stampo superas fortojn de unu homo; sed nia poŝto ek de 1-a januaro altigis kvaroble la poŝttarifon. Kaj tio estas super mia financa ebleco.

Mi ne deziras altigi prezojn de stampoj en novaĵ-servo, kaj se mi devos daŭrigi, mi devos malgraŭ mia antaŭa intenco peti de novaĵ-abonantoj kaj mendantoj kovron de poŝt-elspezoj. Laŭ miaj provizoraj kalkuloj estus necesa por sendotaj 4 stampoj aldoni unu internacia Rkp.

Tio tamen signifas nemalgrandan prezaltigon kaj mi do volas aŭdi opiniojn de novaĵ-partoprenantoj, ĉu ili konsentas kun tiuj novaĵ kondiĉoj.

En Fenikso vi ankaŭ trovos novan liston de haveblaj stampoj. Ĝi enhavas pli ol cent ofertojn, kaj vi certe trovos tie stampojn ne nur por via kolekto sed ankaŭ por via estonta interŝanĝo, ĉar duoblaĵoj estas ĉiam bezonataj.

Ne forgesu, ke per mendo ĉe Stampo-Servo vi subtenas finance nian klubon kaj eldonadon de Fenikso.

En tiu-ĉi loko mi devas danki al membroj, tiuj per donacitaj stampoj tiel grandanime helpis. Precipe amiko Bielak donacis plurajn dek-ojn da stampoj, eĉ malnovaj. Plue donacis en pasinta jaro stampojn la amikoj: Manninger, Dalet, Mikulski kaj Lakemond, kiun mi pardonpetas pro ankoraŭ ŝuldata respondo.

Por fino mi volas alvoki membrojn al pluj donacoj de stampoj, precipe tiuj el iliaj du-

oblaĵoj, kiuj mankas en la listo de haveblaj stampoj, kaj kiuj povos ĝojigi aliajn membrojn.

-o00o-

Frank Tichý

ESPERANTOSTAMPOJ 1970. (daŭrigo)

26) Warszawa. 1.15.12. Tago de Esperantolibro.  
Kvinlinia sta en pola lingvo. (E-stelo).

ESPERANTOSTAMPOJ 1971.

- 1) Poznan 9. 8.3. Internacia tago de virinoj.  
Ronda senkadra sta en lingvoj pola kaj E.  
Meze portreto de pola verkistino.
- 2) Lyon Terreaux. ekde februaro. Varbstampo  
por 63a franca E-kgr. Maldekstre ronda  
datstampo, dekstre 6-linia teksto en  
franca lingvo, stelo kaj leono.  
Datstempo troviĝas en 2 tipoj:  
a) (1 er ARR.)    b) (1 er ARR)
- 3) Lyon. 63-e Congres national d'Esperanto,  
11.IV.1971. (Stelo kaj leono) ronda d. 35
- 4) Nürnberg 1. 49-a Germana Esperanto Kon-  
greso. 10-11.4.1971. (monogramo AD Dürer-  
jaro 1971) ronda. d. 35.

Tekintetes, Nagyságos, Méltóságos

D-ro Szemenyei el Hungario bonvole tradukis la mistikajn vortojn sur la hungara karto (vidu Fenikso pĝ. 10). Li skribis:

Antaŭ ol mi tradukas tiujn vortojn, mi klarigas ilian uzadon. Se oni skribis leteron al iu en la pli frua reĝimo (do ne en la socialisma socio, kie ne plu estas "rangoj"), oni uzis ĝenerale 3 titolojn antaŭ la nomo de la adresiti. Tiuj titoloj grade diferencis unu de la alia depende de tio, kian altan rangon la ad-

resito havis.

La plej malalta (ordinare uzita por ĉiu) estas  
Tekintetes = Estimata, (aŭ Honorinda)

La titolo de mezaltrungulo estas:

Nagyságos = Altestimata (aŭ Tre Honorinda),

La titolo de ĉefrangulo estas:

Méltóságos = Ekcelenca.


Sed nun oni jam ne uzas tiujn "titolojn", simple  
oni adresas ekzemple: Al K-do... aŭ Al S-ro...  
eĉ se la adresato estas ĉeffunkciulo, ekz.  
urbestro aŭ ministro.

-o00o-

□

KUN ĜOJO NI BONVENIGAS 3 NOVAJN AREK-ANOJN !

- 38) D-ro Antonio DE SALVO,  
Via Olbia 15. I - 00182 Roma, Italio.  
Kol. Pm. Sta. + ĉiuspecaj Esperantaĵoj  
(revuojn, librojn, prospektojn, afiŝojn,  
kartojn k.t.p.)
- 39) Christian Bechtoldt,  
Kiefernweg 4, D-534. Bad Honnef/Rhein,  
Germanio. (DBR). Kol. Pm. Sta.
- 40) J. Kuijpers,  
Lombardkade 85 b, Rotterdam - 3001,  
Nederland. Kolektas E-Pm kaj E-sta sur  
bele afrankitaj poŝtaĵoj kaj sufiĉe klare  
legeblaj.



Form-  
ato  
40 x 15  
mm

Nia membro Jindra František skribis, ke li  
lastjare sukcesis trovi neatenditan raraĵon,  
nome: registritan leteron kun E-stampo de la  
13-a UK en Praha 1921, kun surgluita "Reko-

etikedo", kies teksto estas kiel ĉi tie montrita. R kaj la kadro estas ruĝaj, teksto nigra.

Ni neniam antaŭe aŭdis pri tia etikedo, kiu absolute apartenas al la temo Esperanto. Oni devas rigardi ĝin kiel vere raraĵo.

La temo "Reko-etikedoj" certe estas tre malzorgita. Se eble aliaj kolektantoj konas pliajn okazojn, kie oni uzis R-etikedojn kun teksto en Esperanto, bonvolu skribi.

En la nova Sta-katalogo estas rubriko por tiu temo. Bedaŭrinde la sciigo pri la etikedo de Praha venis tro malfrue por trovi lokon en la tiea listo.

#### GLUMARKOJ 1971 (daŭrigo de nr. 11)

- 5) 56-a UK. London, 2 nuancoj en "56"  
a) olivverda, b) helverda
- 6) 26-a kgr. de SAT-amikaro. Yvetot, Francio.  
10-12 april 1971. C. d. 40 mm. trê.  
Verda teksto sur flava papero.
- 7) Esperanto en Haarlem. Nodatita marko.  
(V)(23x35) fol. 5x4= 20, trapikita.  
La folio enhavas 12 markojn kun la sama bildo de Zamenhof kaj 8 markojn kun div. bildoj de konstruaĵoj en Haarlem. Blua kaj blanka sur verda fono. Fol. kostas 0,50 fl. (aldonu sendkoston). Mendeble ĉe H.T. Menges Godfr. v. Buillonstr. 59. Haarlem, Nederlando. (giro: 40 92 48) Sendis Lakemond.

Dum la venontaj 3 somermonatoj ni ferios, sed tamen ne flankenmetas la kolekt-intereson. Se vi vojaĝos kaj "kongresos" kaj tial trovas novaĵojn por ni, ne forgesu skribi al Fenikso tiel ke ni ĉiuj partoprenos en viaj trovaĵoj. En venonta numero, unuan de septembro.